ISSN 2072-5825

# Espero Katolika



Numero 7-9/2020

Julio-Septembro 2020

JARKOLEKTO 117 - N. 1188-1190 - Julio/Septembro 2020

**_Sur la kovrilo:_** Kromordinara beno Urbi et Orbi - al Urbo kaj Mondo de la papo Francisko la 27-an de marto 2020

## ENHAVO

MESAĜO DE LA PAPO URBI ET ORBI: VUNDIĜO IĜIS ESPERO 35

BONVOLEME NIN REGAS SUPERULARO 38

KARDINALO SARAH: NE EBLAS ALIRI EŬKARISTION KOSTE DE PROFANADO 39

KARDINALO MÜLLER: KRIZO DE LA EKLEZIO ELIRAS EL FORLASO DE DIO KAJ EL ADAPTIĜO AL KULTURO 40

» LA ETERNULO ESTAS KUN MI KIEL POTENCA HEROO!« KAJ NI TIMU NENION! 41

KARDINALO SARAH: VIRUSO RESTARIGAS EKLEZION AL LA KOMENCOJ 43

LA VIVO NE ESTAS SABLOLUDEJO 45

LA TRIAN TAGON (kanto) 45

TIU, KIU NEGADAS EKZISTON DE DIABLO, TIU NE KOMPRENAS TRANSCENDON DE DIO 46

„RAJTO DE VIRINO POR LIBERA ELEKTO“ 47

DIO, MI PEKIS (kanto) 48

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>

**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>

**UEA-konto “ikue-v” * Banko:** “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio

tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E**.

**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Pavol Petrík - **Ĝenerala Sekretario/ Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli,Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# Mesaĝo de la papo Urbi et Orbi: VUNDIĜO IĜIS ESPERO

***Teksto de la paska mesaĝo de la papo Francisko Urbi et Orbi el baziliko de la sankta Petro el la 12-a de aprilo 2020***



Karaj gefratoj, belan Paskon!

Hodiaŭ anoncas la eklezio al la tuta mondo: „Jesuo resurektis! – Li vere releviĝis!“

Tiu ĉi bona mesaĝo kiel nova flamo ekflamis nokte. En la nokto de la mondo, kiu jam luktas kontraŭ epokaj problemoj kaj nun ekpremis ĝin pandemio, kiu disponigas nian grandan homan familion al malfacila provo. En tiun nokton sonas voĉo de la eklezio: „Kristo, mia espero, reviviĝis!“ *(Paska sekvenco).*

Ĝi estas alia „infekto“, disvastiĝanta de koro al koro, ĉar ĉiu homa koro atendas tiun bonan mesaĝon. Estas tio infekto de espero: „Kristo, mia espero, reviviĝis!“ Ne temas pri ekzorcaĵo, per kiu disiĝos la problemoj. Ne, tio ne estas la resurekto de Kristo. Tio male estas venko de la amo super radiko de malbono, la venko, kiu „ne transpontigas“ suferon kaj morton, sed trairas ilin, ĝi irebligas la vojon tra la profundaĵoj kaj transformas malbonon je bono, kio estas ŝirmomarko de la Dia potenco.

Tiu Resurektinta estas Krucumita, neniu alia. Sur sia glorigita korpo Li portas neforviŝeblajn vundojn: la vundojn, kiuj iĝis espero. Al Li ni turnu nian rigardon, por ke Li sanigu vundojn de la turmentata homaro.

En tiu ĉi tago mi prefere pensas pri tiuj, kiuj estis rekte trafitaj per kronviruso: pri malsanuloj, pri tiuj, kiuj mortis, kaj pri la parencoj, kiuj priploras morton de siaj karuloj, kun kiuj ili eĉ ne povis laste adiaŭi. La Sinjoro de la vivo akceptu en sian regnon mortintojn kaj Li donacu konsolon kaj esperon al tiuj, kiuj ĝis nun estas provitaj, precipe al maljunuloj kaj soluloj. Ke ne manku Lia konsolo kaj necesega helpo al tiuj, kiuj estas precipe vundeblaj, do al laborantoj en hejmoj de pensiuloj aŭ al tiuj, kiuj vivas en kazernoj aŭ prizonoj. Por multaj Pasko signifas solecon, travivitan en malĝojo kaj malfaciloj, kaŭzitaj fare de pandemio, ekde la korpa suferado ĝis ekonomiaj problemoj.

Tiu ĉi epidemio senigis nin ne nur de inklinemo, sed ankaŭ de eblo persone ĉerpi konsolon el sakramentoj, precipe el la sakramento de Eŭkaristio kaj repaciĝo. En multaj landoj ne estis ebla aliro al ili, sed la Sinjoro ne lasis nin solecaj! Ni restas kunigitaj per preĝo, ni estas certaj, ke Li etendas sur nin sian brakon (komp. Psa 138,5) kaj emfaze Li ripetas al ni: „Mi reviviĝis kaj mi ĉiam estas kun vi“ (Roma meslibro)!



Jesuo, nia Pasĥo, donu forton kaj esperon al kuracistoj kaj flegistoj, kiuj ĉie atestas pri zorgemo kaj amo koncerne proksimulojn ĝis totala elĉerpiĝo kaj ne malofte ĝis ofero de la propra sano. Al ili, kiel ankaŭ al tiuj, kiuj strebas garantiadi esencajn servojn necesajn por civitana kunvivado, al ordotena kolegaro kaj soldatoj, kiuj en multaj landoj klopodas al loĝantoj helpi en iliaj malfacilaĵoj kaj doloroj, apartenas niaj simpatioj kaj dankemo.

Dum tiuj ĉi semajnoj la vivo de milionoj subite ŝanĝiĝis. Por multaj estas la hejma restado por reflekto kaj por halto de hastema vivritmo, por ke ili estu kune kun siaj gekaruloj kaj ke ili reciproke ĝoju. Sed por multaj tio estas tempo de timzorgoj pri estonto, kiu ŝajnas esti malcerta, pri laboro, kies perdo minacas, eĉ koncerne pluajn konsekvencojn, kiujn alportas la nuna krizo. Mi instigas ĉiujn, kiuj havas politikan respondecon, ke ili aktive pledu por la komuna bono de ĉiuj kaj ke ili faciligu, ĝis tion la cirkonstancoj permesos, revenon al la kutima ĉiutaga aktivado.

Tio ĉi ne estas tempo por indiferenteco, ĉar la tuta mondo suferas kaj ĝi unuece bezonas fronti pandemion. Ke la resurektinta Jesuo donu esperon al ĉiuj malriĉaj kaj al tiuj, kiuj vivas en periferioj, al rifuĝintoj kaj senhejmuloj. Ke ne estu lasitaj en soleco tiuj ĉi niaj plej malfortaj gefratoj, vivantaj en niaj urboj kaj periferioj de ĉiuj mondpartoj. Ke ne manku al ili bazaj vivrimedoj, nuntempe malfacile akireblaj, kiam estis starigitaj multaj aktivecoj, kiel estas akiro de medikamentoj kaj antaŭĉio eblo de la adekvata sanitara prizorgo. Ke konsidere al tiuj ĉi ĉirkonstancoj estu mildigitaj internaciaj sankcioj, kiuj forprenas de landoj, al kiuj ili estis embargitaj, eblon donadi adekvatan helpon al siaj civitanoj, kaj ke al ĉiuj ŝtatoj estu donita eblo fronti tiujn plej grandajn ĉi-momentajn bezonoj kaj ke al ili estu reduktitaj aŭ ja eĉ pardonitaj ŝuldoj, kiuj ŝarĝas buĝeton precipe de tiuj plej malriĉaj.


Tio ne estas tempo por egoismo, ĉar la alvoko, kiun ni frontas, nin ĉiujn kunigas kaj ĝi ne faras diferencojn inter la homoj. Inter multaj mondpartoj, trafitaj per kronviruso, mi precipe pensas pri Eŭropo. Post la Dua Mondmilito povis tiu ĉi kontinento leviĝi danke al konkreta spirito de solidareco, kiu ebligis superi pasintan rivalecon. Kiel neniam antaŭe estas antaŭĉie dum la nuntempaj cirkonstancoj urĝa, ke tiu ĉi rivaleco denove ne ekregu kaj ke ĉiuj agnosku, ke ili formas unu familion kaj reciproke sin subtenadu. La Eŭropa Unio nuntempe staras antaŭ epoĥa alvoko, de kiu dependas ne nur ilia estonto, sed eĉ la estonto de la tuta mondo. Ke ĝi ne vanigu eblon doni pluajn pruvon de solidareco eĉ helpe de novaj solvoj. Alternativo



estas nur egoismo de la partiaj interesoj, tento al reveno en pasinton kune kun risko eldoni al dura provo la pacan kunvivadon kaj progreson de la venontaj generacioj.

Tio ne estas tempo por dividado. Kristo, nia paco, prilumu tiujn, kiuj responsas pri konfliktoj, por ke ili havu kuraĝon akcepti alvokon al entuta kaj senpera batalhalto en ĉiuj mondanguloj. Tio ĉi ne estas tempo por daŭrigi produktadon kaj vendon de armiloj, malŝpari grandegajn kapitalojn, kiuj devus esti uzitaj por zorgo pri homoj kaj por savo de la vivoj. Maturiĝis tempo, por ke finfine ĉesu longtempa milito, pro kiu sangas amata Sirio, konflikto en Jemeno kaj streĉo en Irako, kiel ankaŭ en Libanio. Estas tempo, ke israelanoj kaj palestinanoj denove ekdialogu kaj trovu stabilan kaj daŭran solvon, ebligantan al ambaŭ flankoj vivon en la paco. Ke estu finita suferado de la loĝantoj vivantaj en la orienta Ukainio, ke ĉesiĝu terorismaj atakoj farataj kontraŭ senkulpaj homoj en diversaj landoj de Afriko.

Tio ĉi ne estas la tempo por forgeso. Ke la krizo, kontraŭ kiu ni luktas, ne lasu forgesi pri multaj aliaj krizokazaj situacioj, kiuj kaŭzas suferon de multaj homoj. Ke la Sinjoro de la vivo montru sian proksimecon al la loĝantaro de Azio kaj Afriko, trairantaj la malfacilajn humanitarajn krizojn, kiel en regiono Cabo Delgato norde de Mozambiko. Ke Li ĝojigu korojn de multaj homoj, kiuj forfuĝas estante sen hejmoj kaŭze de militoj, sekeco kaj malsato. Ke Li protektu multnombrajn migrulojn kaj forfuĝintojn, inter ili multajn infanojn, vivantaj en neelteneblaj kondiĉoj, precipe en Libio kaj landlime de Grekio kaj Turkio. Kaj mi ne volas forgesi la insulon Lesbon. Ke Li permesu al Venezuelo atingi konkretan kaj senperan solvon, ebligantan liveradon de la internacia helpo al loĝantoj, kiu suferas kaŭze de gravaj politikaj, socie-ekonomiaj kaj sanitaraj cirkonstancoj.



Karaj gefratoj,

indiferenteco, egoismo, dispartigo, forgeso vere ne estas vortoj, kiujn ni volas aŭdi en tiu ĉi tempo. Ni volas ilin forigi el ĉiu tempo! Ŝajnas, ke ili dominas, kiam ni estas venkitaj fare de timo kaj morto, tio signifas, kiam ni en nia koro kaj en nia vivo ne lasas venki Sinjoron Jesuon. Li, kiu venkis morton kaj malfermis al ni pordon de la eterna savo, elpelu obskuron el nia kompatinda homaro kaj enkonduku nin en Sian brilantan tagon, kiu ne konas mallumiĝon.

Kune kun tiuj ĉi reflektoj mi al vi ĉiuj deziras benitan Paskon! ■

*Fonto: Vatican News*

# BONVOLEME NIN REGAS SUPERULARO

## Komentario Eklezio kaj mondo

*Angella Pellicciari*



*AngellaPellicciari*

»Vi havus nenian povon kontraŭ mi, se ĝi ne estus donita al vi de supre« (Joh 19,11), diris Jesuo al la roma guberniestro. Katolikaj monarĥoj ĉiam regis kun konvinko, ke tiu ĉi eldiraĵo estas rajtigita. Konsciante, ke eĉ se ili havus neniun implicitan subtenon de diversaj sociaj tavoloj, ekzistas leĝo, kiun oni devas respekti, klare enskribita en ĉiuj koroj kaj mensoj, tial do la absoluta reganto devas absolute respekti de Dio donitan eternan leĝon.

Poste venis erao de konstituciaj monarĥioj kaj post ili respublikoj, en kiuj ne plu estis io absoluta, ĉio estis ligita al konsento, al voĉplimulto en parlamento. Esceptoj estis validaj reguloj fiksitaj en Konstitucio. Sed kio okazas nuntempe? Ĉu ni revenis al superularo, reganta per ĉiela povo desupre? Tion neniam! Tiel profunden ni ne subiĝis. Ni ja estas modernaj! La sinjora moŝto en malbutonita jako eksplikas simple, ja eĉ familiare por ĉiuj amaskomunikiloj, ke la rezultoj, kiujn ni atingis, estas tiaj, ĉar ni estas eminentaj, do ne nur pro tio, ke li tiel brile zorgis pri nia ĉeestado, kiel eĉ pri la estonto. Sed li ne estis elektita de Dio por stari frunte de nia nacio. Escepte, ke Dio elektus iun, kiu opinias kredon kiel elekteblan kompletigon ne pli gravan ol estas tabako, la sakramentojn li opinias kiel nenion kaj respektas eĉ ne pietas koncerne mortintojn, kio estas karakterizo de nia kulturo ekde la tempoj de la roma res publica. Ĉu tiu ĉi sinjora moŝto estas premiero laŭ Konstitucio? Eĉ ne tio estas evidenta konsidere, ke li ĝin sagace evitas. Ne parolante pri scienculoj, kiuj sin elektis, por helpadi al li en tiu ĉi malfacila situacio regi sen parlamento, kiuj urĝe rekomendas, ke al la pli aĝuloj estas necese helpadi distingadi, kio estas ĝusta kaj kio malcerta, laŭnature por ilia bono. Ĉu eble tiel ne agas eĉ Dio? La maljunuloj do restadu hejme. La aero ne prosperas al ili. La vivo por ili ne estas. Ili restu hejme meditante. Ili pripensadu, kia ŝarĝo ili estas por tiuj, kiuj al ili pagos pension kaj kiuj zorgos pri ili, kiam ili ekmalsaniĝos. Ili finfine pripensu kaj eluzu okazon, kiu estas laŭ radikale demokratia principo proponita al ĉiuj, nome libere priservi sin per eŭtanazio.

Sed tiukaze la moŝta sinjoro pruvis kuraĝe opozicii al scienculoj, kiujn li elektis por regi. Kun granda prudento li rifuzis nekonstitucian normon, enkondukantan inter civitanoj sub kaj super sesdek jaroj, kio es-



*Arko de la Paco, Milano*

tis ŝatata temo de parolisto de Movado de Kvin Steloj, Beppe Grillo. Flanke li restigis la hebrea-kristanan kredon, kiu primeditas la centjaran prapatron Abrahamon, kun kiu koncipis naŭdekjara Saran; flanke li ankaŭ restigis Moseon, kiu estis okdekjarulo, kiam lin la Eternulo sendis al Egiptio liberigi popolon el sklaveco; flanke li restigis pluajn konstituciajn normojn. Al kiu li invokas? Kiu estas patro de la moŝta sinjoro, kiu al ni kun tia afableco memorigas, kiel bone li al ni regas? Kies ni iĝis servutuloj, alvokitaj esti subuloj pro nia bono, kiam estis prokrastitaj balotoj, en kiuj la popolo plej verŝajne preferus elekti registaron de la dekstra mezo? Al kia scienco ni estas devigitaj kompleze subiĝi? ■

*La artikolo de la itala historiistino kaj publicistino el la interreta portalo La Nuova Bussola Quotidiana, el la 29-a de aprilo 2020.*

## Kardinalo Sarah: NE EBLAS ALIRI EŬKARISTION KOSTE DE PROFANADO

„Eŭkaristio estas nek rajto nek devo, ĝi estas donaco, kiun ni ricevas neprofiteme de Dio kaj kiun ni devas akceptadi kun estimo kaj amo,“ diras prefekto de la Kongregacio por Liturgio kaj Sakramentoj la kardinalo Robert Sarah.



„Neniu rajtas malpermesi al sacerdoto konfespreni kaj donadi Eŭkaristion,“ diras la kardinalo Sarah reage al situacio en Italio, kie la kredantoj ne povas partopreni la sanktajn mesojn jam preskaŭ du monatojn. Krom tio registaraj dekretoj liberigantaj sanitarajn sekurigojn ne plu antaŭvidas permeson de la publikaj liturgioj. La itala episkoparo estas devigata intertrakti kun la registaro kaj la negacioj rilatas senescepte la internajn ekleziajn demandojn, kiel estas maniero de la akceptado de la sankta komunio.


La kardinalo Sarah sin akre determinis kontraŭ iuj teknikismaj solvoj, pri kiuj informis amaskomunikiloj. Reveno al Eŭkaristio koste de profanado estas malakceptebla. La Plejsanktan Sakramenton estas necese trakti per maniero inda de Dio. Estas malakceptebla ekzemple ideo, ke la hostioj estu disdonataj en plasta pakado de mempriserva maniero. „Ni ne povas trakti Eŭkaristion kiel banalan objekton. Ni ne estas en magazeno. Tio estas absoluta frenezeco,“ komentas la kardinalo Sarah en interparolo por portalo Nuova Bussola Quotidiana. Li ankaŭ memorigis, ke en la eklezio estas plu valida regulo, ke la kredanto havas liberon de elekto, ĉu li akceptados la sanktan hostion sur la manon aŭ en la buŝon. Tiu ĉi regulo devas esti respektata, diris la prefekto de la Kongregacio por Liturgio kaj Sakramentoj. Li ankaŭ avertis antaŭ alkutimiĝo spekti la sanktajn mesojn el rekta transmisio de televido aŭ interreto. „Dio estas enkorpiĝinta, ne la virtuala realeco. Tiu ĉi maniero estas ankaŭ grave erariga ankaŭ por sacerdotoj. Dum la sankta meso devas la sacerdoto rigardi al Dio. Anstataŭ tio li nun alkutimiĝas rigardi televidan kameraon kvazaŭ temus pri spektaklo. Tiamaniere oni ne plu povas daŭrigi,“ emfazas la kardinalo Sarah.

Krome li aldiras, ke pri la diablaj provoj de la atakoj kontraŭ la Eŭkaristio oni ne povas miri, ĉar ĝuste ĝi estas la koro de la vivo de la Eklezio. „Mi estas tute konvinkita, ke la ĉefa problemo estas la kredo de la sacerdotoj“ – konstatas la kardinalo Sarah. „Se la sacerdotoj konsciiĝus, kio estas la sankta meso kaj la Eŭkaristio, tiam la certaj malĝustaj manieroj de la celebradoj aŭ hipotezoj pri la komunio ne aperus en ilia menso.“ ■

*Vatikano, la 2-an de majo 2020*

## Kardinalo Müller: KRIZO DE LA EKLEZIO ELIRAS EL FORLASO DE DIO KAJ EL ADAPTIĜO AL KULTURO

**„La veneno, kiu paralizas eklezion, estas opinio, ke ni devus adaptiĝi al spirito de nuntempo, al spirito de tiu ĉi epoĥo, kaj ne al la spirito de Dio,“ diris la kardinalo Müller. La krizo, al kiu hodiaŭ la katolika eklezio frontas, ekestas kaŭze de strebado – ja eĉ de kelkaj personoj en la eklezio – idee proksimiĝi al la nuntempa kulturo kaj forlasi instruon de la kredo, deklaris la kardinalo Gerhard Müller.**



„La krizo en la eklezio estas kaŭzita per homo kaj ĝi ekestis tial, ke ni oportune adaptiĝas al spirito sen Dio,“ diris la kardinalo al miloj da katolikoj kolektiĝintaj en Phoenix dum kunveno de la studentaj gvidantaj personoj, kiun organizis Komuneco de la Katolikaj Universitataj Studentoj (FOCUS).

„La veneno, kiu paralizas la eklezion, estas opinio, ke ni devus adaptiĝi al spirito de la nuntempo, al spirito de tiu ĉi epoĥo, kaj ne al spirito de Dio – la opinio, ke ni devus relativigi ordonojn de Dio kaj nove interpreti instruon pri la revelaciita kredo,“ li diris.

Li atentigis, ke eĉ en la eklezio vico da homoj „sopiras“ pri la katolikismo sen dogmoj, sen sakramentoj kaj sen neeraripova instru-ofico.

La kardinalo Müller, eksprefekto de la Kongregacio de la Kredinstruo, celebris la sanktan meson la 1-an de januaro 2020 en la Festotago de la Dipatrino, la Virgulino Maria. En sia homilio li ekmeditis pri la homa sopiro akceptadi surogatan kontentiĝon, kiam Dio estas ignorata.

La dankesprimo al Sinjoro estas ŝlosilo al feliĉo

„Sed tiu, kiu kredas, bezonas neniun ideologion,“ li deklaris. „Tiu, kiu havas esperon, ne tuŝos drogojn. Tiu, kiu amas, ne sopiras pri allogaĵoj de tiu ĉi mondo. Tiu, kiu amas Dion kaj siajn proksimulojn, trovas feliĉon en sinofero.“

„Feliĉaj kaj liberaj ni estos tiam, kiam ni propriĝos al ni vivmanieron, al kiu Dio persone vokas ĉiun el ni: en la sakramento de geedzeco, en celibata sacerdoteco aŭ en ordena vivo laŭ tri evangeliaj konsiloj – malriĉeco, obeemo kaj pureco – pro la regno de Dio,“ li daŭrigis.

La kardinalo Müller emfazis, ke la dankesprimo al Dio estas la baza konsistaĵo de la kristana vivo. Komence de la nova jaro li alvokis katolikojn esprimadi dankemon por

tuta kreitaĵaro, por tio, ke en la mondon estis sendita Kristo kiel nia Savinto, por la beata Virgulino Maria, por la katolika eklezio, por donaco de la familio kaj por ĉiuj benoj, kiujn oni tiel facile akceptas kiel memkompreneblon.

„Ni kristanoj konsciiĝas, ke al la vivo apartenas muziko: En niaj koroj sonas kanto de la dankesprimo pro nia savo. Ĝia melodio estas la amo kaj ĝia harmonio estas la ĝojo en Dio," li diris.

Anstataŭ enmetadi esperon en la sorton, la kristano agnoskas, ke la sufero estas neevitebla, sed malgraŭ tio estas eble trovadi ĝojon en Kristo, kiu ankaŭ suferis kaj malfermis al ni pordon al la eterna vivo, li diris.

Sed en tiuj ĉi malfacilaj tempoj la skandaloj en la eklezio kaj krizo en tradicie kristanaj komunumoj en Okcidento kondukas multajn al tio, ke ili skrupule metas al si demandon, ĉu la roko, sur kiu Kristo starigis sian eklezion, ne ruiniĝos, aldiris la kardinalo.

„Iuj opinias, ke la katolika eklezio postrestadas 200 jarojn post la nuntempa mondo. Ĉu tiu ĉi kulpigo estas vera?"

Tiuj, kiuj alvokas al modernigo, postulas, por ke la eklezio pro kreo de la „nova religio de la monda unueco" rifuzu tion, kion ĝi opinias vera, avertis la kardinalo Müller.

„La ununura prezo, kiun la eklezio devus pagi pro tio, ke ĝi estu akceptita en tiun megareligion, estus rezigno pri sia pretendo je vereco. Ŝajnas, ke tio ne estus tiel granda problemo, ĉar la relativismo superanta en nia mondo ja rifuzas ideon, ke ni entute povus koni veron, kaj ĝi sin eldonas kiel garantianto de la paco inter ĉiuj mondkonceptoj kaj la mondaj religioj."

La postkristana socio bonvenigas tiujn ĉi strebojn transformi eklezion je „oportuna civitana religio", diris la kardinalo. La kuracilo kontraŭ sekularigo en la eklezio estas la vivo de la kredo, la vivo en la konstanta vero de Kristo, diris la kardinalo. Dio, kiu estas eterna, ne povas ŝanĝiĝi laŭ kapricoj de la socio, li emfazis. „La Dia universala vero, kiu estis ĉeestanta en la konkreta homa estulo, en Jesuo Kristo Nazareta, estas ĉeestanta ĉi tie kaj nun – en spaco kaj tempo de nia historio," li diris. „Jesuo Kristo ne estas reprezentanto de iu vero, kiu validus nur ekster nia tempo: Li persone estas la Vojo, Vero kaj Vivo." ■

*El raportoj de Catholic News Agency kaj Catholic Herald, 21.03.2020.*
*RC Monitor 5/2020*

# » LA ETERNULO ESTAS KUN MI KIEL POTENCA HEROO!« KAJ NI TIMU NENION!

**Homilio de sac. Zvonimir Pavičić en la vespera sankta meso en Meĝugorje, la 3-an de aprilo 2020 pri la biblia fragmento el Jer 20,11.**

Judoj volis ŝtonmortigi Jesuon, sed Li eskapis el iliaj manoj. La rilato inter Jesuo kaj judoj, kiuj ne akceptadis Lin kaj eĉ ne lian instruon estas ĉiam pli senpacienca. Ĝis nun tio estis kvietaj atakoj, kalumniado inter si reciproke, sed nun la evangeliisto prezentas al ni tre streĉitan situacion, en kiu ili prenas ŝtonojn, por ke ili mem faru punon, kiun Li laŭ ili meritas – kaj tio estas ŝtonmortigo. Sed Li eskapas el iliaj manoj. Ankoraŭ ne maturiĝis lia tempo. Tiu pli poste venos.

Se ni ekrigardos rilatojn inter judoj kaj Jesuo, ni ekvidos, ke estis tiuj, kiuj Lin, laŭ evangeliaj raportoj, facile akceptadis, sed estis eĉ tiuj, kiuj Lin tute akcepti ne kapablis. Tiuj duaj estis precipe reprezentantoj de pastroj kaj skribistoj, kun kiuj Jesuo konstante konfliktis. Nune ne estis por ili gravaj agoj

de Jesuo, sed liaj vortoj. Li mem sin nomis Dio. Do Dion Li nomis sia Patro, kaj tio signifas, ke Li estas lia Filo, do, ke eĉ Li mem estas Dio. Por judoj tio estis neimagebla. Ĉar en fundamentoj de ilia kredo je Dio estas fakto, ke Dio estas nur unu kaj ke ekzistas neniu alia Dio. Sed nun aperas iu – Jesuo – kiu pri si asertas, ke Li estas Filo de Dio, ke Li estas Dio. Kaj pro tio Li estas en iliaj koroj kondamnita – ĉar Li pri si proklamas, ke Li estas Dio.

Ĉi tie ni povus konkludi, ke ili ne estis malbonaj, nur ili defendis sian kredon kontraŭ ebla blasfemado. Sed ankaŭ ni povas konkludi, ke ili ne estis sufiĉe malfermitaj al Dia gvidado, kaj precipe pro ĉio tio, kion Jesuo faris en ilia nacio. Kaj precipe gravaj estas agoj de Jesuo. Eĉ Li mem pri siaj agoj diras, ke liaj agoj estas bonaj, kaj tiel eĉ Li mem ilin demandas, pro kiuj el tiuj agoj ili kondamnas Lin? La agoj estas bonaj kaj pro ili Li ne estas kondamnata, sed la vortoj estas danĝeraj kaj pro tiuj Li estas kondamnata. Tial ili en siaj koroj kondamnas Jesuon, sed ankoraŭ ili ne realigas sian verdikton, ĉar ankoraŭ ne maturiĝis por tio tempo.



Fratoj kaj fratinoj, la hodiaŭa evangelia fragmento diras, ke ne estas eble akcepti Jesuo nur parte. Do akcepti Lin en io kaj en tio dua ne. Jesuon ni devas akcepti tute. Alikaze ni mem al ni skribos kondamnon. Jesuon oni ne povas dispartigi kaj poste preni tion, kio al ni plaĉas, kaj forĵeti aŭ



prisilenti tion, kio al ni ne plaĉas. Eĉ se ni nuntempe scias, kiel tion multaj praktikas. Ili akceptas de Jesuo nur tion, kio estas por ili facile plenumebla kaj kredebla, kaj ĉion tion, kio ŝajnas por ili esti tro malfacila, ili forĵetas. Sed tiuj tiukaze ne akceptas Jesuon, sed akceptas siajn proprajn interesojn, siajn proprajn ideojn kaj inklinojn – kiujn ili enpakas en vortojn, volon aŭ instruon de Jesuo. Tio estas unu granda hipokritado kaj grandega trompo. Tio estas vojo en abismon, el kiu estas malfacila reveno.

Hodiaŭ la kredantoj timas atesti pri tiu Kristo, kiu iradis sur tiu ĉi tero dissemante amon, kiu akceptadis ĉiujn en amo. Tiu Jesuo neniun trompadis, sed Li ne fermadis okulojn antaŭ peko, ne subtenis iujn perversecojn, degenerecojn. Li akceptadis homojn, kiuj enfalis tiajn statojn, sed Li ilin savadis el tiaj situacioj.

Sed hodiaŭ multaj kristanoj postulas, por ke en la nomo de Dio, en la nomo de Jesuo Kristo, ili akceptadu ĉiun perversecon, ĉiun frenezecon kaj ĉiun malvirtecon kiel ion normalan, bonan kaj valoran por la socio. Jesuo akceptadis ĉiujn homojn, sed Li deturnadis ilin de malbono, liberigis ilin el pekoj kaj sklaveco de Satano, li resanigadis ilin

kaj neniam li akceptadis pekon. Sed li liberigadis homojn de la pekoj. Tial eĉ ni hodiaŭ ne povas akceptadi ion, kio estas peko. Ni devas prediki pri la amo de Dio kaj Leĝo, kiun Li enskribis en niajn korojn. La Amon, kiu kuracas korojn rompitajn per peko, eĉ Leĝon, kiu defendas homon kontraŭ perdo de la propra digneco.

Tiu, kiu estas volema en ĉio sekvi la vortojn de Jesuo, ofte sin sentas kvazaŭ profeto Jeremio, tre perfidita de siaj amikoj kaj kalumniita el ĉiuj flankoj. Kiomfoje al ni okazas, ke ĝuste tiam, kiam ni laŭlitere sekvas vortojn de Jesuo, la socio kraĉas sur nin, mensogas pri ni, simple nin ne akceptas. Esence ili ne akceptas Jesuon. Kaj ili opinias, ke se ili povas silentigi nin, ke ili silentigos eĉ Jesuon kaj ke ili nuligos lian Leĝon. Sed la Eklezion eĉ pordegoj de Hades ne superfortos, ĉar estas konstante kun ĝi ĝia Kapo – Jesuo Kristo, kiu ĝin per sia Spirito direktas laŭ ĝusta vojo kaj defendas ĝin de ĉiu herezo kaj tiel ĝin kondukas laŭ la sekura vojo al la domo de la Patro.

Ni konsciiĝu, fratoj kaj fratinoj, ke ne estos facile por ni en ĉi tiu mondo ĝis kiam ni predikos instruon de Jesuo, sed ni estu certaj, ke konstante ni havas helpon de Dio, ĝuste same kiel la profeto Jeremio, kiu jubilas: »La Eternulo estas kun mi kiel potenca heroo!« (Jer 20,11) Kaj kun ni estas ĉiam Sinjoro, se ni vivas laŭ liaj vortoj. Tiujn vortojn ni ĵus aŭdis kaj ni ilin disrompis kiel panon kaj satigis nin per ili. Ni konstante aŭdas liajn vortojn: Ni satigas nin per ili kaj ili plene priregu niajn korojn! Ili akrigu nian konsciencon, por ke ni konstante iradu laŭ vera kristana vojo de la kredo, espero kaj amo!

Kaj nuntempe en la koro ni ripetadu vortojn de la profeto Jeremio: » La Eternulo estas kun mi kiel potenca heroo!« kaj ni timu nenion! ■

## Kardinalo Sarah:
## VIRUSO RESTARIGAS EKLEZION AL LA KOMENCOJ

***Tro ofte volis la eklezio pruvadi, ke ĝi estas „el tiu ĉi mondo“ kaj tial ĝi dediĉis sin al ĝenerala aprobado de la aferoj pli ofte ol al apostolado, diras gvinea kardinalo Robert Sarah, ĉefo de la Kongregacio por Liturgio kaj Sakramentoj. En komentario publikigita sur la paĝoj de la franca ĵurnalo Le Figaro li demaskas, kiel timo antaŭ morto, kiu nuntempe iĝis ununura orientilo de la sekulara socio, kondukas al neniigo de homeco. Kaj la voĉo de la eklezio, kiu devas esti voĉo de la espero superstaranta la sekularan dimension, antaŭ tiu ĉi memdetruema pragmatismo tre facile kapitulacias.***

„Ĉu do entute la eklezio havas iun lokon dum la epidemio, kiu venis en la 21-a jarcento?“ – demandas la kardinalo Sarah kaj li daŭrigas: „Diference de la pasintaj jarcentoj estas plejmulto da sanitaraj servoj prizorgataj fare de ŝtato kaj la sanitara personaro. La moderna tempo havas siajn sekularitajn heroojn en blankaj manteloj – kaj verdire ili estas admirindaj. Ne plu estas bezonataj aroj da kristanaj bonfarantoj, kiuj zorgus pri la malsanuloj kaj entombigus mortintojn. Ĉu la eklezio iĝis por la socio senbezona?

La viruso *Covid-19* revenigas kristanojn al la komencoj. Verdire la eklezio eniris la partieman rilaton al la mondo jam antaŭlonge. Meze de la socio asertanta, ke ĝi la eklezion ne bezonas, la kristanoj pere de pedagogiaj rimedoj strebis pruvi, ke ili kapablas esti utilaj. La eklezio sin prezentadis kiel edukistino, patrino de malriĉuloj, „fakistino en homeco“, dirite per la vortoj de Paŭlo la Sesa. Kaj ĝi rajte tiel faris. Sed la



kristanoj iompostiome forgesis la kaŭzojn de tiu ĉi lerteco. Kaj fine ili forgesis, ke se la eklezio kapablas helpadi al homo, por ke li estu pli homeca, estas tio tial, ke de Dio ĝi ricevis vortojn de la eterna vivo.

La eklezio engaĝiĝas en la batalo por pli bona mondo. Prave ĝi subtenas ekologion, pacon, dialogon, solidarecon kaj egalan distribuon de riĉaĵoj. Ĉiuj tiuj ĉi luktoj estas ĝustaj. Sed ili povas konduki al forgeso de la vortoj de Jesuo: »Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo«. La eklezio havas mesaĝon por tiu ĉi mondo nur tial, ke ĝi havas ŝlosilojn de la alia mondo. La kristanoj kelkfoje opiniis eklezion kiel helpilon, kiun Dio donis al la homaro, por ke Li plibonigu ilian vivon sur ĉi tiu mondo. Kaj ne mankis al ili kaŭzoj, ĉar la kredo pri la eterna vivo fakte donas lumon por la ĝusta vivo en la nuntempa mondo. La viruso *Covid-19* malkovris insidan malsanon, kiu absorbas la eklezion: la supozo, ke ĝi »estas el tiu ĉi mondo«. Ĝi sin volis senti legitime en ĝiaj okuloj kaj laŭ ĝiaj kriterioj.

Sed elmerĝis radikale nova realeco. La triumfanta moderneco ruiniĝis ĉe renkonto kun la morto. Tiu ĉi viruso malkovris, ke spite de ĉiu asekurado kaj sekurigado la mondo restas paralizita per timo pro morto. La mondo povas solvi la sankrizojn. Certe ĝi superos ankaŭ krizon ekonomian. Sed neniam ĝi solvos misteron de la morto. La respondon nur la kredo havas.

Ni rigardu tiun ĉi aferon tute konkrete. En Francio same kiel en Italio, iĝis la baza demando la hejmoj por senioroj. Kial? Ĉar la demando de la morto ekestis rektlinie. Ĉu iliaj maljunaj loĝantoj devus esti fermitaj en siaj ĉambroj, eldonitaj al danĝero, ke ili mortu en malespero kaj soleco? Aŭ ĉu ili prefere devus resti en kontakto kun siaj familioj riskante, ke ili mortos pro viruso? Ni ne sciis, kiel respondi.

La ŝtato enmerĝita en sekularismon, kiu principe decidas pri ignorado de espero kaj elpelado de kulto en privatajn sferojn, estis kondamnita al silentado. Ununura ĝia solvo estas evito de fizika morto por kia ajn kosto, eĉ se tio signifus morton moralan. La respondon povus alporti nur la kredo: akompanadi la maljunajn homojn al verŝajna morto en digneco kaj antaŭ ĉio en espero je la eterna vivo. ■

*Vatikano - Le Figaro, 19.05.2020*

# LA VIVO NE ESTAS SABLOLUDEJO

**La tekniko superis ĉiujn distancojn, sed kreis neniun proksimecon.** M. Heidegger

Unu el kaŭzoj de koraflikto de multaj niaj samtempuloj estas manko de la homa proksimeco. Trafe al mi sian solecon en propra familio formulis unu dekokjara junulino, kiu plendis: “Ni estas en la tuta domo sep, sed mi tie sentas min tute sola.” Eble per la sama maniero esprimus sin ankaŭ la ceteraj ŝiaj familianoj.

Dum al iuj homoj mankas sento de kun-aparteneco kaj travivaĵo de unuigo kun aliuloj, aliaj homoj male ne havas tendencon kreadi devontigajn rilatojn. Motivigo, kial tiel estas, pli facile trovus psikologio, sociologio, pedagogiko kaj pluaj socioscienсaj fakoj.

Se temas pri la tendenco daŭre evitadi la devoligajn promesojn, mi opinias, ke la kaŭzo kuŝas en malemo porti tutvive la devontigan rilaton. Motivo de tio ofte estas timo pro respondeco, sento de liberecperdo, ŝato de komforto kaj egoismo. Tiuj motivoj povas esti ankaŭ kaŭzo de kreskanta nombro de kunvivado de paroj sen geedziĝo, malkresko de naskokvanto kaj eĉ ankaŭ malkresko de devontiĝo vivi en celibato.

Multaj plenkreskuloj kondutas kvazaŭ infanoj. Ili volus provi geedzecan vivon, sed nur kiel ludon. Se la ludo kun unu partnero ilin tedas, ili foriras ludi je geedzeco kun alia persono sur alian sabloludejon. Multe da junaj viroj volus elprovi pastran funkcion aŭ travivi monaĥan pozicion, sed ankaŭ nur kiel bubecan ludon. Se tio en paroĥejo aŭ monaĥejo al ili ĉesos plaĉi, ili foriras ludi aliloken. Ĉiuj ĉe tio forgesas, ke ekzistas rilatoj, kiujn oni ne povas nur provi.

Nur al malgrandaj knaboj, kiuj ludas kun lignaj pistoloj je ŝtelistoj kaj policanoj, estas permesite interŝanĝi la rolojn. Por ili el tio rezultas neniu respondeco, neniu sekvo je realaj interhomaj rilatoj. Ĉe plenkreskuloj, se ili ne volas al la aliuloj malproksimiĝadi kaj travivadi perdon de la proksimeco, tio ne validas.

**Al la ĝojo de la homa animo** kontribuas, ke en la homa vivo oni povas ludi la ludojn, sed en la ludoj oni ne povas travivi la tutan vivon. Beleco de la proksimeca rilato eliras el fideleco al sia vorto kaj neniu tekniko nek kemio ĝin kapablas anstataŭi. Ja la fruktoj de la Dia Spirito, kiu superas ĉiun malproksimecon, estas krom la menciita fideleco ankaŭ la amo, boneco kaj pacienco – kiel jam skribas sankta Paŭlo. ■

*Max Kašparů*

## LA TRIAN TAGON

(originale verkita en Esperanto)




LA TRIAN TAGON • M kaj E (originale verkita):
Albrecht Kronenberger, 2020-04-12, la Paskan Dimanĉon

# TIU, KIU NEGADAS EKZISTON DE DIABLO, TIU NE KOMPRENAS TRANSCENDON DE DIO

La papa universitato Regina Apostolorum kunlabore kun Grupo de la sociala-religieca esplorado kaj informado (GRIS) organizis jam la 14-an jarkurson pri ekzorcismo kaj preĝo por liberigo (6.-11.5.2019).

Tiu ĉi seminario anstataŭas instruon de demonologio kaj anĝelologio, kiu malaperis el teologiaj fakultatoj, kaj dum tempo de sia ekzistado ĝi pruviĝis esti la plej efikanta rimedo de la eklezio por pli profunda ekkono de tiuj ĉi instruoj kaj diversaj influoj de demoneca efikado en la mondo – de la antropologia kaj sociala, trans neŭrologia ĝis kriminologia kaj jura sinsekvoj. La novaĵo de la nunjara kurso estis „ekumena ronda tablo“, al kiu alsidiĝis reprezentantoj de diversaj kristanaj konfesioj. La ritualon de ekzorcismo (eĉ se en diversaj variantoj) praktikas la ortodoksa eklezio kaj ankaŭ diversaj protestantaj konfesioj.



Diference de la ĝenerala konvinko la sestagan studan seminarion partoprenis ne nur ekzorcistoj, sed diversvaria publiko de la katolikaj animzorgaj laborantoj kaj pluaj interesatoj, informas unu el organizantoj, la dominikana ekzorcisto, fr. François Dermine: „Unuavice ne temas pri kurso destinita por ekzorcistoj, eĉ se multaj el ili ĝin partoprenas. Kolektiĝas ĉi tie diversvaria publiko de la aŭskultantoj, kiu sopiras konatiĝi pri la temaro kunigita kun multaj superstiĉoj kaj mistero. Do antaŭĉio ĉeestas sacerdotoj, kiuj volas informiĝi pri la ofico de ekzorcisto aŭ kiuj sin preparas por ĝia praktikado je postulo de sia episkopo, plue instruistoj de religio, animzorgaj laborantoj, psikologoj kaj psikiatroj, juristoj, kaj eĉ membroj de sekurecaj organoj, ĉar temas ankaŭ pri satanismo. Tio do plenigas vakuon, kiu ekestis en la teologiaj fakultatoj post tio, kiam preskaŭ en ĉiuj estis forigitaj seminarioj de anĝelologio, demonologio kaj ekzorcismo. Tio okazis kulpe de certa racionala manovro en la universitata instruo kaj en la klopodo pri pli granda animzorga celado de la teologiaj kursoj. Tiukaŭze estis ĉesigita instruo de la tuta vico da temoj, opiniantaj esti duarangaj, kvankam tiaj ili fakte ne estas. Ekzemple la seminario de anĝelologio estas tute principa kiel el vidpunkto dogmatika, tiel ankaŭ morala kaj animzorga. Jesuo mem diris, ke la influo de la diablo ekzistas kaj estas ĉieĉeestanta, sen tio ke ni, kiel mi aldiras, kompreneble malantaŭ ĉio ne devas tuj serĉi diablon. Tamen mi opinias kiel tute necesa ion pri li ekscii...“

La instruofico de la eklezio – komprenata kiel universala instituto – ĉiam kaj konstante heroldis ekziston de la diablo kaj ĝian influon en la mondo. Sojle de la jarmilo estis eldonitaj en du eldonserioj aktualigitaj ceremonioj de ekzorcismo (1998, 2004) kaj la eklezio deziras, ke en ĉiu diocezo estu nomumita sacerdoto-ekzorcisto, daŭrigas la franca dominikano. Iuj membroj de la eklezio, inkluzive de tiuj, kiuj havas decidan influon pri formado de novaj generacioj, bedaŭrinde la efikadon de la malbona spirito subtaksas:

„Se malaperos konscio pri ekzistado de la diablo kaj lia influo, tiam ni plu eĉ ne sukcesos klare ekrigardi la Dian transcendon kaj mision de Jesuo Kristo. En la letero al Hebreoj kaj ankaŭ en la unua letero de Johano klare tekstas, ke Dia Filo venis por finigi efikadon de la diablo. Kaj tiun argumentadon eblas neniel misaŭdi...,“ diras rande de la roma kurso pri la ekzorcismo kaj preĝo fr. François Dermine. ■

*www.vaticannews.va/cs.html, 14.5.2019*


# „RAJTO DE VIRINO POR LIBERA ELEKTO“

**Biblia kaj historia pravigo**

Antaŭ nelonge vizitis Pollandon konata *pro life – por vivo* aktivistino Abby Johnson. Ŝia signifo estas des pli grava, ĉar ŝi siatempe estis en Usono manaĝerino de la abortiga kliniko. Sed kiam ŝi konvinkiĝis, ke la nenaskita infano en la patrina sino, kiu iĝis viktimo de la abortigo, estas homa estulo, ŝi ŝanĝis sian sintenon kaj hodiaŭ ŝi estas ardanta pledistino de la nenaskiĝita vivo simile kiel antaŭe usona kuracisto Bernard Nathanson, kiu faris milojn da abortigoj. Post kiam li faris filmon, vidante ke la infano en la patrina sino sin tenas kiel homo, ĝi flankeniĝas antaŭ kureto kaj silente ĝi plendas pro terura doloro, tuj li ŝanĝis sian opinion kaj li iĝis granda batalanto kontraŭ abortigoj. Tio devigas nin al la sekvaj reflektoj, ĉar la monato marto kun sia festo de Anunciacio la 25-an de marto okazas en signoj de diversaj agadoj por la vivo en diversaj lokoj.

**Rajto mortigadi**

En okcidenta t.n. demokratia socio batalakiris masonistoj, feministinoj kaj novmarksistaj genderistoj dum lastaj ĉ. 60 jaroj sinsekve en preskaŭ ĉiuj landoj senpunecon de abortigo. En komunisma socio tio estis ankoraŭ pli frue, en Rusio mallonge post bolŝevisma oktobra revolucio en la jaro 1920. Oni tion majeste pravigas per t.n. „rajto de virino libere decidi pri sia gravedo“. Jes, ĉiu edziĝinta virino havas tiun rajton, sed nur surbaze de interkonsento kun edzo, se objektiva situacio ne permesas naskigon de plua idaro, pri la seksa abstinenco, eventuale per uzado de metodo de laŭnatura planado de gepatreco, sed ne post kiam ekestis grevedo. La needziĝinta virino havas neniun objektivan moralan rajton je ekstergeedzeca kuniĝo, kiu estas grave peka, kaj se la peko havanta sekvojn okazis, des pli poste ekzistas absolute neniu etika licencio „libere decidi pri sia gravedo“. Ĉi tie ja temas pri rajto je la vivo de tiu plej sendefendebla homa



*PhDr. Radomír Malý prelegas*

estulo!

„La rajto de libera elekto“, kiel tiu ĉi plej nova amasmurdado, havanta analogion al jakobena, komunisma aŭ naziisma genocidoj estas nomata, estis penetrigita ekde legalizo de la abortigoj en t.n. esceptaj situacioj (minaco de la vivo de naskintino, gravediĝo kaŭze de perfortigo, incesto) fare de salamometodo ĝis la „rajto“ de virino kiam ajn submetiĝi al abortigo senkiale ĝis la kvara monato de gravedo. Sed hodiaŭ ni plu progresis direkte al infera pordego, ĉar poraborta organizo kiel Planned Parenthood ideigas senliman eblon de la „libera elekto“ dum la tuta graveda tempo, kio jam pli longan tempon funkcias en Usono, kaj en komunista Ĉinio ekzistas politiko de „du infanoj“ (pli antaŭe nur de unu infano), kiam virino, se ŝi trian fojon gravediĝis, devas iri al deviga abortigo. ■


*PhDr. Radomír Malý, 25.2.2020*

***„La sankta meso havas siamaniere tian valoron, kian havas por niaj animoj la surkruca morto de Jesuo.“ (s-ta Johano Orbuŝa)***

***„Per preĝo ni postulas de Dio gracojn, per la mes-ofero ni devigas Lin, ke Li ilin donu al ni.“ (s-ta Filipo Neri)***

# Dio, mi pekis

(originale verkita en Esperanto)




3. Mi nur ĉasis brilantan strason,
pretervidis la diamanton.
Mi neglektis Vin, mian Dion,
mian propran bonon.

4. Vi deturnu min for de l' strato
al pere' min loganta.
Rekonduku min sur la padon
min gvidantan al vivo.

DIO, MI PEKIS • M (kun la 4a psalmotono) kaj E: Albrecht Kronenberger
2020-04-11, la Sanktan Sabaton